

Notoj por la Historio de BEJO

RIO ESPERANTISTA numero 4, okt-dec/88, paĝoj 4-5

1987 estis, sendube, festa jaro. Esperanto centjariĝis, BEL okdekjariĝis kaj BEJO dudekjariĝis. Kaj kiam oni dudekjariĝas, estas taŭga momento por ke unuafoje oni rigardu malantaŭen.

En la komenco estis kvin junuloj en Rio de Janeiro: Alfredo Enio Duarte, Francisco Wechsler, Jair Salles, Sar-

torato. Estis la jaro 1964 kaj Paulo Sérgio Vianna kaj Aloisio preskaŭ ĉiusabate ili renkontiĝis en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo kaj ankaŭ en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Tiam interalie ili diskutis entuziasme pri la neceso fondi TEJO-sekcion en Brazilo.

Sed, en alia ekstremo de Brazilo, pli precize, en Fortaleza la sama penso venis al la kapo de kvin entuziasmaj junuloj: Carlos Lima Mello, Francisco Barbosa, Cesar Oliveira Barros Leal kaj du aliaj kies nomojn mi ne plu memoras. Al tiu grupo aliĝis la sekvintan jaron Roberto Passos Nogueira.

Malgraŭ la manko de kontakto inter la du grupoj, ambaŭ decidis ne tuj fondi brazilan junularan organizaĵon, sed atendi la tiam baldaŭ okazonta XIX Brazila E-Kongreso en Rio de Janeiro por diskuti kun alistatataj junuloj la konevenecon de tiu iniciato.

Kaj tiel okazis. En oktobro/65, la du grupoj renkontiĝis dum la kongreso kaj decidis ke la plej taŭga vojo antaŭ ol fondi BEJO-n estus organizi lokajn grupojn. Konsekvence aperis la du unuaj junular-grupoj: en Rio, Guanabara Esperanto-Junularo (GEJ) kaj en Fortaleza, Ceará Esperanto-Junularo (CEJ).

Dum du jaroj la du grupoj aktive

agadis en siaj respektivaj teritorioj, varbante pli da membroj. Ili ankaŭ prelegis pri E-o kaj organizis plurajn kursojn en-kaj-ekster esperantaj organizaĵoj. Kaj dum tiu periodo, ili eldonis siajn proprajn bultenojn en senriproĉa esperanto-lingvaĵo: "Meteoro" oficiala organo de Guanabara Esperanto-

Junularo, kaj "Verda Maro", oficiala organo de Ceará Esperanto-Junularo.

En 1967, la membroj de la du grupoj denove renkontiĝis. Ĉi-foje, en Santos Dumont, Minas Gerais, okaze de la II Esperanto-Seminario de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Post kunveno de prok. 30 gejunuloj venintaj el diversaj brazilaj ŝtatoj, oni konstatis ke la grundo jam estis bone preparita kaj decidis fondi BEJO-n "provizore". Ĉiuj aprobis kaj subskribis la dokumenton konatan kiel "Deklaro de Santos Dumont" (vidu IMPULSO N° 1) kaj oni elektis provizoran estraron, kiu havis kiel ĉefan taskon la prepon de la statuto de la organizaĵo.

En la sekvanta jaro, okaze de la III Esperanta Seminario, en Nova Friburgo, la brazila junularo denove kunvenis kaj decidis pri la oficiala fondo de BEJO, aprobante ĝian statuton kaj konfirmante la "provizoran" estraro por plia du-jara mandato: Francisco Stefano Wechsler (Prezidanto), Roberto Passos Nogueira (Vic-Prezidanto de la Norda kaj Nordorienta Regionoj), Wilson Ferreira Martins (Vic-Prezidanto de la Suda Regiono), Umberto Ferreira (Vic-Prezidanto por la Centra Regiono), Paulo Sérgio Viana (Generala Sekretario) kaj Aloisio Sartorato (Kasisto).

En la komenco estis kvin junuloj en Rio de Janeiro: Alfredo Enio Duarte, Francisco Wechsler, Jair Salles, Sartorato. Estis la jaro 1964

La sidejo de BEJO funkciis en Rio de Janeiro, kie ekzistis tiutempe la plej forta loka junulara movado, kaj kie loĝis tri el la estraranoj: Francisco, Paulo Sérgio kaj Aloísio.

BEJO glate progresis. Fondiĝis novaj junularaj grupoj en pluraj urboj. La oficiala organo (IMPULSO) aperis kaj "furoris" en-kaj-eksterlande, TEJO akceptis la oficialan aliĝon de BEJO.

La tri estraranoj en Rio estis plene sargitaj je pluraj laboroj. Francisco zorgis pri la revuo ĉe la presejo (ĝi estis sub la redakta respondeco de Nogueira) kaj pri eksterlandaj kontaktoj (TEJO, UEA kaj aliaj). Paulo zorgis pri enlanda korespondado, kontakto kun junulargrupoj kaj redaktado de BEbo (BEJO informabulteno). Mi respondecis pri kasistaj laboroj kaj kunhelpis Paulo en la redaktado de BEbo, krom zorgi pri ĝia presarango. La ceteraj vicprezidantoj agadis laŭeble en siaj respektivaj regionoj.

Tamen, en la dua semestro de 68, okazis eta krizo en BEJO. Paulo Sérgio, pro personaj kialoj, devis forlasi la estraron kaj mi subite estis sargita ankaŭ de la sekretariaj kaj redaktaj laboroj de li faritaj ĝis tiam.

La situacio fariĝis por mi neeltenebla, ĉar ne estis eble fari samtempe la laboron de du personoj. Tiam mi skribis al Mello, Nogueira kaj José Mário (el Natal): la junulara movado en Rio malfortiĝis, dum en nordoriento ĝi daŭre prosperas (tiutempe, jam estis okazintaj du regionaj E-renkontiĝoj organizitaj ek-

skluzive de la junularo!); do, alvenis la momento por ke la administra parto de BEJO iru al la manoj de nordorientanoj. Kaj en 1969, en São Paulo, okaze de la E-a Seminario tie okazinta, elektigis nova BEJO-estraro, kies prezidanto fariĝis José Mário

Marques, el Natal, ĝenerala sekretario, Carlos Lima Melo, el Fortaleza, kaj kasisto, Iraci Sales Nobre, el Natal. Vic-prezidantoj fariĝis:

Marcelo Engrácia Garcia (Sudo), Manoel Floro (Oriento), Roberto P. Nogueira (Nordoriento), Waldir Antonio Silvestre (Centro).

BEJO, do, komencis novan tre pozitivan fazon (la "nordorientan"). La revuo daŭre aperis. Novaj grupoj estiĝis. Oni instruis la lingvon amase. Tamen la politikaj okazajoj de la 70-aj jaroj en nia landa ankaŭ atingis la

movadon. "Oni diris" ke iu membro de Rio Grande do Norte E-Junularo okazigis politik-tendencon kunvenon en la esperantista sidejo. La sekurec-polico sciis pri la afero kaj pluraj

membroj de la junulara grupo estis invititaj ĉeesti al la policejo por doni klarigojn pri tiu afero (ĉu ili ankaŭ estis perfortitaj, mi ne scias, tamen oni konjektis pri tio). Tia okazintaĵo grave malvarmigis la entuziasmon de la nordorientanoj. Iom post iom BEJO agoniis kaj, finfine, komplete stagnis.

Nur en 1975, kiel fenikso, ĝi revivigis el la cindroj pere de junulargrupo en Rio de Janeiro, sub la gvido de Ciro Gomes de Freitas. Sed tio estas alia historio, kies detalojn povas pli bone rakonti la dua generacio de BEJO-anoj.

...pluraj membroj de la junulara grupo estis invititaj ĉeesti al la policejo por doni klarigojn...

En 1969 (...) komencis novan tre pozitivan fazon (la nordorientan). Tamen la politikaj okazajoj de la 70-aj jaroj en nia lando ankaŭ atingis la movadon

La Dua Festivalo Pri Populara (Ĉu Popola?) Muziko

La Timiga Komenco

Meze de soifa atendado kaj murdema etoso, komenciĝis – aŭ ektumultis – la Festivalo. Per surdiga blekado ĝi ankoraŭ pli bombaste finiĝis. Kaj inter la komenco kaj la fino estis aŭdebla iom da muziko, kiom permesis la nervostado de la spektantaro. La ejo Maracanãzinho sajnris areno kie gladiatoris la gekantistoj, fervore penantaj aŭdebligi sin.

Restas do la demandoj: ĉu valoris tiela klopodado? Kia estis la artnivelo – aŭ fus-nivelo – de la Festivalo? Ĉu prezentigis taŭgaj kanzonoj? Ĉion ĉi ni strebos al vi respondi, se ne ĉiuj muzoj estis forpeltitaj de Rio de Janeiro.

La afero dividiĝis je du partoj: la Brazila kaj la internacia. Komisiono havis la inferan taskon selekti, el inter centoj da plagiatataj, maldecaj, simplaj bruoj kaj kelke da seriozajoj, 46 aŭskulteblajn pecojn. Finfine, post harstarigaj diskutoj kaj disputoj, elektigis la feliĉa grupo. Tiun ĉi oni provis prezenti en du nokto-sesioj. La publiko vigle partoprenis en la fenomeno, eligante plej variajn kromakompanojn, kiuj iris de simpla aplaŭdo ĝis kromata fajfo. Post pluraj komplotoj, la juĝkomisiono elsavis 20 komponaĵojn, kaj el tiuj ĉi aperis fine la venkintoj.

La Polemika Nokto

En la lasta nokto ĉiuj ploris: kelkaj

de ĝojo, la cetero de malĝojo kaj furiozo. (Ni aparte diru, ke ja ne troviĝis motivo por tiela ekscitigo; vere, la plejmulto de l' kanzonoj estis trankviliga, eĉ tiel, ke ni endormiĝis apud la televidaparato; sed ni ne analizos ĉi tiujn.)

Tamen, ni emfazu la valoron de kelkaj. La tria lokon gajnis la kanzono “Carolina”, de fama Chico Buarque de

“La duan lokon ricevis ‘Travessia’ de Milton Nascimento, (...) tamen ĉi kanzono probable ne sukcesos akiri popularecon, ĉar la teksto estas peza, kvankam bela.”

Komisiono havis la inferan taskon selekti, el inter centoj da plagiatataj, maldecaj, simplaj bruoj kaj kelke da seriozajoj, 46 aŭskulteblajn pecojn.

Holanda. Multaj asertas, ke li meritis la unuan lokon pro la delikateco de l' melodio kaj liriko de la teksto. Eble tion pravas, ke en Rio ĉiuj ĝin fajfas kaj kantetas: kredeble en la resto de Brazilo jam okazas la samo.

La duan lokon ricevis “Travessia” de Milton Nascimento, elektita – kvankam ne merite – la plej bona kantisto de la Brazila parto. Tian klasifikon la spektantaro generale aprobis, tamen ĉi kanzono probable ne sukcesos akiri popularecon, ĉar la teksto estas peza, kvankam bela.

Granda polemiko ankoraŭ furiozas pri la kanzono ricevinta la unuan lokon: “Margarida”, de Gutemberg Guarabira. La teksto estas trafa, sed la muziko vekas diskutojn, ĉar la aŭtoro enmiksas folkloran melodion kiel refreno, krom la “Nupta Marŝo” de Mendelssohn ĉe la fino. Vere, la kanzono estas heterogena, kaj ni tre dubas, ĉu “Margarida” meritis klasifikon.

“La plejmulto de l' kanzonoj estis trankviliga, eĉ tiel, ke ni endormiĝis apud la televidaparato.”

prezenti en du nokto-sesioj. La publiko vigle partoprenis en la fenomeno,

Parto de l' publiko forte aplaudis “Fuga e Antifuga” (“Fugo kaj Kontraŭfugo”), muziko de Edino Krieger kaj teksto de Vinícius de Moraes, tre bela kanzono; sed ĝi ne meritas la epiteton “populara”, ĉar tro klasikema kaj kontraŭpunkteca. Apartan admiron vekis la knabino Gracinha Leporace, kiu sukcesis interpreti firme kaj samtempe delikate komponaĵojn de sia frato. (Ĝi estis unu el la maloftegaj momentoj, kiam la publiko ne bruaĉis, sed aŭskultis.)

La Ĵaz-internacia Parto

Unu semajno poste, komencigis la internacia parto de l' Festivalo. Dume, svarmis tra l' tuta urbo minijupoj de famaj (ĉu pro talento aŭ muzika aŭ fizika?) kantistinoj el la tuta mondo. Bedaŭrinde, la nivelo de l' kantado ne estis tiel alta, kiel la rando de la jupoj. Vere, vere, importitajn artiklaĉojn ni devis engluti. Popola muziko preskaŭ ne aperis – jazo dominis la mensojn de la komponistoj.

Saviĝis nur kelkaj havantaj indiduecon: la Greka, la Usona, la Monaka kaj unu aŭ du aliaj. La cetero estis tute sensaŭca kaj senspica.

La fina rezulto estis unuanime malakceptita: venkis Itallando kies sablona komponaĵo plaĉis al neniu. La duan lokon ricevis Usono, kun kolosa blekado fara de l' hordo – pardonon! – publiko. Sed la ejo preskaŭ falis, kiam oni disanoncis la trian lokon: Brazilo (partopreninta per “Margarida”); okazis vera simfonio de orelsiraj sonoj; neniam manifestiĝis tiel laŭta protestado. Ekde tiam, ni suspektas, ke la Brazilanoj estas iomete soviniismaj...

Sufiĉas nur aldoni, ke la juĝkomisiono rifuĝis malantaŭ fortikegaj kirasoj. Ke la aŭto de unu el la juĝistoj

“La juĝ-komisiono rifuĝis malantaŭ fortikegaj kirasoj,(...) la aŭto de unu el la juĝistoj estis duone dispremita de l' atakema spektantaro.”

estis duone dispremita de l' atakema spektantaro. Kaj ke ĉiuj eksterlandaj gekantistoj esprimis sian miregon pri la “pasia konduto” de la brazila popolo. Kompreneble, tion ili diris laŭde...

Karaj amikoj, venontjare okazos nova Festivalo, se pluvtorento ne detruos la urbon Rio ĝis tiam. Do, nur atendu! Ĉar tuta Rio promesas venontjare ankoraŭ unu fojon elmontri siajn gastemon kaj pasion pri muziko. Se la muzoj permesos, eĉ ne unu eksterlanda kantisto restos viva!

Finfine Esperanto estis akceptita ĉe Unuigintaj Nacioj!

En la oficialiga tago oni petis de nia heroo, Maŭrico, la verdulo, ke li deklamu poemon, en esperanto, kiu pruvu la facilon, belsonon kaj la internaciecan “memkompreneblon” de nia kara lingvo. Kaj tion li plej brile faros! Ni vidu!

“La Aĵo”

En iu ejo iuj ja umas!

Jen ulo kaj ino en ia geo!

Kia ujo!

Kaj kial tiaj aĉas ĉie?!

Kiojn?

Ĉu?

Abund'!

La Brazilia Nova Kino

Enmeza de la nuna produktado de filmoj en Brazilo, ekzistas movado, kiu povas esti konsiderata kiel ekflagro de nacia kin-konscio. Tiun movadon kelkaj insistas nomi "Nova Kino".

Brazilia Nova Kino ne eksplodis interne de la kinĉambroj sen ia kialo, ajnmaniere. Krom la sanĝo aŭ renovigo, kiujn trairis la kino laŭ monda vidpunkto, la pli profunda kono pri niaj problemoj, matureco da la publiko kaj industriigo kreis kondiĉojn, por ke tuj aperu kino vere "nia", malsama al ĉio, kion ĝis tiam oni faris.

La filmo, kiu praktike malfermis la nov-kinajn vojojn, estis "Rio 40 Graus" (Rio 40-grada) de Nélsion Pereira dos Santos. En artikolo por la Franca kinrevuo "Positif", Glauber Rocha diras ion al ni pri N. P. dos Santos kaj ties filmo: "Estis li, kiu unue faris filmon sendependan laŭ la entreprena vidpunkto – Rio 40 Graus (1954-a) – kaj tie oni trovas la unuajn politikajn poziciojn antaŭ la kolonieska situacio de Brazilo."

En lando, kia Brazilo, plena de konfliktoj, kontrastoj kaj mizeroj la temoj estas grandegaj por ĉia arto. Nia literaturo estas vasta, kaj tekstoj por kino ne mankis. La granda Brazilia problemo, kiu estas la nord-oriento, influis sur ĉiuj artaj fakoj kaj ne povus ne sentigi sin ankau en kino.

Multaj direktistoj movis siajn kamerojn al la kamparo, al la interno de la nord-orienta regiono, kiu ĝis hodiaŭ, en kelkaj partoj povas esti konsiderata kiel prototipo de feŭdisma socio.

"La filmo, kiu praktike malfermis la nov-kinajn vojojn, estis 'Rio 40 Graus' (Rio 40-grada) de Nélsion Pereira dos Santos"

En lando, kia Brazilo, plena de konfliktoj, kontrastoj kaj mizeroj la temoj estas grandegaj por ĉia arto.

Antaŭe, kino farata tie ĉi ne havis bonas teknivelon. Oni bezonis do temon sufiĉe drameca por kompensi tian teknik-mankon, kaj satigi la popolon, donante ian komercan profiton. Grava filmo, kiu komencis tiun ĉi periodon estis "O Cangaceiro" (La Bandito) de Lima Barreto, inkluzive premiita en la Festivalo de Cannes. La filmo pri "cangaceiros" (speco de banditoj de nia nord-orienta regiono) rapide komercigis kaj transformigis en ia speco de "Uson-vakera" genro en Brazilo.

Tuj aperis verkajoj bazitaj sur ĉi tiuj temoj, kiuj surprizis la plej intelektcan publikon, ĉar multfoje ili ne havis bonan komunik-kapablon kun la popolo. Ili estis kelkfoje iom hermetikaj filmoj. Kiel ekzemplojn oni citas: "Deus e o Diabo na Terra do Sol" (Dio kaj Diablo en la Lando de l' Suno) de Gláuber Rocha; "Vidas Sêcas" (Sekaj Vivoj) de Nélsion Pereira dos Santos, filmo konsiderata kiel unua vere matura de l' movado; "A Hora e a Vez de Augusto Matraga" (La Horo kaj Ŝanco de Aŭgusto Matraga) de Roberto Santos; "Menino de Engenho" (La Knabo de l' Kanplantejo) de Válder Lima Jr.; kaj aliajn.

"'Vidas Sêcas' (Sekaj Vivoj) de Nélsion Pereira dos Santos, filmo konsiderata kiel unua vere matura de l' movado"

Oni povas diri, ke tie ĉi ekzistas konscia kino, ligita kun kaj partoprenanta en la vivo de la lando. Kino, kiu jam akiris propran teknikon,

komencante de preskaŭ-improvizajo kaj de ne imitado al jam difinitaj skoloj; kino renoviganta valorojn estetikajn kaj moralajn.

Ĝia kvalitpruvo povas esti, ekzemple, la varma akceptado de tiaj filmoj en Eŭropo, precipe en Francujo.

(*) proto: ĉefa kaj pratipa.

(...)

La plimulto de la direktistoj estas ankoraŭ je la unua aŭ dua verkajo, kaj nur kelkaj jam faris tri aŭ pli. Aliaj direktistoj faras filmojn inter nova kaj

malnova kin-skoloj, iom aŭ tute ekstere de la movado, kiel: Anselmo Duarte (O Pagador de Promessas – La Votplenanto), ĉefpremio en Cannes; Roberto Farias (Assalto ao Trem Pagador, Selva Trágica – Prirabo al la Mon-trajno, Tragedia Ĝangalo); Válder Hugo Khouri (O Corpo Ardente, Noite Vazia, As Amorosas – La Arda Korpo, Vakua Nokto, La Amorulinoj); kaj aliaj.

Augusto Freire

El Impulso n-ro 3 / 1968

Dum la Brazila Kongreso de la Junularaj Esperantistoj (Brazila Junula Esperantista Asocio - BJEJA) okazinta dum la lasta semajno de Julio 1979, en Uberabo, Minas Gerais, Brazilo, prelegas japana doktoro F. Ykema pri “LA DANĜEROJ DE LA MALSANO konata sub la scienca nomo “VERDAKIS ADO”. Instruis la preleginto ke la konsekvencoj de tiu malsano normale aperas post naŭ monatoj post iu ajn kongreso. Sed tio estas maniero por antaŭenigo de nia movado. m.m.

El Impulso, n-ro 3 / 1979

Se vi jam pretas aĉeti bileton por forveturi al planedo Marso, estu singarda!!!

Antaŭvidante la Futuron

La tuta numero de “Science Journal”, Oktobro 1967, estas dediĉita al iu tre nova kaj alloga temo: scienca antaŭvido de la futuro. (...) Ni ĉerpis kelkajn el la plej interesaj antaŭvidaĵojn kaj ilin prezentos tie ĉi kun la datoj, post kiuj ili eble realiĝos:

- Primitiva artefarita lingvo - 1979
- Evoluo de iu “universala lingvo” el aŭtomata komunikado - 1980
- Biokemiaĵo por kreskigi novajn membrojn kaj organojn - 1995
- Ebleco uzi drogojn por pliigi inteligentecon - 1985
- Ebleco de edukado por rekta inform-enmeto en la cerbon - 1997
- Rekta elektromagneta interago inter cerbo kaj masino - 1990

El Impulso n-ro 2 / 1967

BEJO - Kongresoj

N.	Urbo / Ŝtato	Jaro	Mon.
1	Santos Dumont MG	67	jul
2	Nova Friburgo RJ	68	jul
3	São Paulo SP	69	jul
4	Natal RN	82	jan
5	Iporá GO	83	jan
6	Promissão SP	84	jan
7	Cuiabá MT	85	jan
8	Porto Alegre RS	86	jan
9	Fortaleza CE	87	feb
10	S. José d. Campos SP	88	feb
11	Campina Grande PB	90	feb
12	Tupã SP	91	jan
13	Barra do Garças MT	92	jan
14	São Paulo SP	93	jul
15	Natal RN	94	jul
16	Juiz de Fora MG	95	jul
17	Ribeirão Preto SP	96	jul
18	Curitiba PR	97	jul

KROKODILA

SPECIALA LEKIONO POR
KOMENCANTOJ !!!

VERBO ŜOVI:

Ŝovi suva,
Ŝovi sejn parah !

LANGUO

El Impulso, n-ro 2 / 1983

Venas jardeko,
pasas jardeko kaj...

Laborplano por la Unua
Semestro (BEJO) - 87

- 1 - Starigo de varbkampanjo por pligandigo de BEJO-anaro.
- 2 - Eldoni IMPULSO-n trimonate.
- 3 - Pligrandigi la reprezentantaron.
- 4 - Okazigi regionajn rekontigojn.
- 5 - Okazigi tendumadojn.
- 6 - Prizorgi publikan utilecon de BEJO.

El MOMENTON!, n-ro 25 /1987

BEJO - Nuntempe (1996-1998)

Estraro

Cláudio M. Zaina	prezidanto	Campinas - SP
Reinaldo Marcelo Ferreira	1a sekretario	Pres. Prudente - SP
Carlos Eduardo de Oliveira	1a kasisto	Paulínia - SP
Maximillian Moraes Cid	2a sekretario	Juiz de Fora - MG
James Rezende Piton	2a kasisto	Campinas - SP

Adresoj

Posto: BEJO - Caixa Postal 1097, 13001-970, Campinas, SP - Brazilo
Ret-posto: bejo@digicron.com
Hejm-paĝo: <http://www.digicron.com/bejo>

Ĉu vi konas la "Junul-Kurson", kie Karlo kaj Johanino travojaĝas la planedon instruante esperanton? Post la Aventuroj de Karlo kaj Johanino en la kurso, vi spertos la...

AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO II

(ĉa Krokodilo Kontraŭfakas)



Konsilioj al kursgvidantoj

"NE NUR PAROLU AŬ SKRIBU MULTE... SED ĈEFE VI DEVAS ANKAŬ AGI..."

- * BALDAŬ: AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO III: "SERĈANTE SPOKKA JOHANINON"
AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO IV: "REVENADO DE JEDU JOHANINO"
AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO V: "LA LASTA GATALO"
AVENTUROJ DE JOHANINO KAJ KARLO VI: "LA REKOMENCO..."

IDEO: RUGENS-333
TĤESTOJ: RUGENS-333
DESEĜNIS: RUGENS-333
KOSTUMOJ: RUGENS-333
MUZIKOJ: RUGENS-333

NATIONAL JOHANINO
KID